

SASAKI Teruhiro (Japanio)

La Esperanta traduko de “Eŭgeno Onegin”.

(Por la kongreso en Amsterdama Universitato, 17-18 de Julio, 2008)

Mi komencis instrui Esperanton ne kiel lingvon, sed kiel rusan kulturon, ĉar la formala nomo de miaj lekcionoj estas “rusa lingvo”, “rusa literaturo”, aŭ “kulturo de slavaj nacioj”. Ni devas rilatigi Esperanton kun la Rusio. Unue mi prelegis pri Esperanto kiel la lingva kulturo, naskiĝinta en la Rusa Imperio. En la sekvantaj jaroj mi uzadis Esperantigitajn tekstojn por legado de rusa literaturo. Jen la rezulto de la prelego de Puŝkin. Mi uzis Esperantan tradukon de Eŭgeno Onegin, ĉar gestudentoj jam antaŭe ellernis Esperanton ĉe mi. Mi disdonis al ili japanan tradukon kaj Esperantan. Laŭ japana traduko ili povis scii la enhavon de la romano, kaj mi igis ilin prezenti ŝatatajn frazojn en Esperanta traduko de romano. Al ili tre plaĉis la romano, en kiu aperas la rusa superflua protagonisto. Heroa psiko kaj agada maniero alvokis kompaton eĉ ĉe japanaj junuloj de nuna tempo. Sento de nekonstanteco, maldaŭro, efemereco estas komprenebla de nuntempaj junuloj, kiuj, vivante en la materiale riĉa socio, ne povas senti sin feliĉaj. Ju pli severa detruo de japana socio post la ŝaŭma ekonomio, des pli forte tiu ĉi sento fariĝis. Rusa literaturo estas amata en Japanio ekde komenco 19 centjara. Oni vidas en ĝi iun ideon, similan al orienta filozofio, kiel Budhaismo kaj Taoismo. T. e. sento de vanto, filozofio de nenieco kaj nihilismo.

Esperanta traduko de Eŭgeno Onegin havas grandan meriton-atributon, ke ŝlosilaj vortoj estas tradukitaj pli klare kaj simple ol en la japanaj tradukoj. Mi traktos tiun ĉi temon, uzante ekzemplon de la vorto “vanto”. Elstara Rusa Esperantisto, s-ro Valentin Melnikov mem diras en la antaŭparolo de sia traduko:

«... dum preskaŭ 200 jaroj rimarkinde evoluis ankaŭ la rusa lingvo kaj kulturo. Pluraj vortoj ŝanĝis la sencon, iuj esprimoj iĝis neuzataj kaj pro tio nekompreneblaj por la nuna rusa leganto (ankaŭ por la tradukanto); forgesiĝis iam popularaj verkoj, aludoj al kiuj multas en romano. Hodiaŭ nur fakuloj povas klarigi tion, kio en la epoko de Puŝkin estis konata al ĉiu klera homo. Pluraj fremdlingvaj (ĉefe francaj) esprimoj, kiuj tiam estis naturaj inter la rusaj nobeloj, nun ne plu restas en la aktiva vortuzado eĉ inter kleruloj.»

[p.7 Aleksandr Puŝkin, *Eŭgeno Onegin*. Tradukis el la rusa lingvo Valentin Melnikov. Kaliningrado, Sezonoj, 2005. 256 pp]

FRANCA EPIGRAFO

Tio okazas al la franca vorto “vanité” kaj rusa “sueta”, kiuj ambaŭ devas havi tute saman signifon. Epigrafo, la unua frazo por enkonduko de romano “Eŭgeno Onegin” estis skribita en la franca lingvo, kvankam tio altiras malgrandan atenton ĝis nun. Sed tiu franca frazo havas esencan signifon por la tuta romano.

«Pétri de **vanité** il avait encore plu de cette espèce d’orgueil qui fait avouer avec la même indifférence les bonnes comme les mauvaises actions, suite d’un sentiment de supériorité, peut-être imaginaire.»

Unu ekzemplo de rusa traduko estas sekva.

«Проникнутый **тщеславием**, он обладал еще той особенной гордостью, которая побуждает признаваться с одинаковым равнодушием как в своих добрых, так и дурных поступках, - следствие чувства превосходства.»

Franca «vanité» estas tradukita per la rusa vorto “tshcheslavie”, kiu asociigas signifon “falsa honoramo”. Tiel same nuntempaj francoj komprenas tiun ĉi vorton. En la traduko de s-ro Melnikov “vanité” estas esprimata per la vorto “vanto”.

«Saturita de **vanto**, li havis ankoraŭ certan specon de orgojlo, kiu devigas konfesi kun sama indiferenco kaj siajn bonajn, kaj siajn malbonajn agojn, sekve de sento pri supereco, eble imagata.» [l.c. p.9]

En la alia malnova traduko Nekrasov uzis la vorton “vanteco”.

«Penetrita de **vanteco**, li havis ankoraŭ pli da tiu speco de fiero, kiu konfesigis kun la sama indiferento la bonajn kiel la malbonajn agojn, sekve de sento de supereco eble imagita.»

[N. V. Nekrasov (trad.) A. S. Puŝkin Eŭgeno Onegin . SAT, Paris-Leipzig-Moskva, 1931. p.24]

La vortoj « vanto » kaj « vanteco » havas radikon komunan kun “vanité”, tial ili havas ankaŭ la signifon “falsa honoramo”. Sed miaopinie ĉi tiun francan epigrafon oni ne devas interpreti kiel “honoramo”. Mi volas klarigi kialon de mia hipotezo sekve.

VANTO = VANITÉ

Fama ekzemplo de uzado “vanité” troviĝas en la libro pri Predikanto de la Malnova testamento.

«Vanité des vanités, dit l'Ecclésiaste, vanité des vanités, tout est vanité.»

En la rusa biblio tiu ĉi frazo estas tradukita per la vorto “sueta”, deveninta el sanskrito “śūnya, śūnyata”, kiu havas plej gravan signifon en la Budhaismo.

«Суета сует, сказал Екклесиаст, суета сует, - все суета!»

(Sueta suet, skazal Ekklesiast, sueta suet, - vsjo sueta!)

Angla traduko estas tute same en la komenca versio, sed en angla traduko ni povas vidi kiel diverse oni komprenas ĉi tiun frazon.

«Vanity of vanities,” says the Preacher, “vanity of vanities, all is vanity.”»

En unu el la modernaj tradukoj “vanity” ŝanĝiĝas per la vorto “meaningless”.

«Meaningless! Meaningless!” says the Teacher. “Utterly meaningless! Everything is meaningless.”»

[The NIV Study Bible, New International Version. General Editor Kenneth Barker. Zondervan publishing house, Michigan, 1985]

Kiel estis dirita de Melnikov, dum multaj jaroj rimarkinde evoluis la lingvo kaj kulturo, pluraj vortoj ŝanĝis la sencon, iuj esprimoj iĝis neuzataj kaj pro tio nekompreneblaj por la nuna leganto. Tio estas tre bona ekzemplo, ke la nuna leganto perceptas frazon ne tiel, kiel antaŭe.

Zamenhof tradukis tion per la vorto “vantaĵo”.

«Vantaĵo de vantaĵoj, diris la Predikanto; vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo.»

Vanto, vanteco, vantaĵo, ĉi tiuj vortoj havas saman radikon, tial en mia nuna prelego ne gravas la eta diferenco inter ili. Ni devas konstati, ke la franca epigrafo de “Eŭgeno Onegin” rilatas al la Predikanto de Malnova Testamento. Mi citos kelkajn frazojn el la romano por konfirmi mian tezon, koncerne al “vanto” kaj “sueta”.

VANTO = SUETA

Por la traduko de la rusa vorto “sueta” estas uzata la “vanto”.

Kaj, per kredemo blindigata,	И с легковерным ослеплением
denove la junulin'-amant'	Опять любовник молодой
postkuris ŝin pro ĉarma vant' .	Бежал за милой суетой (sueta)

[3:XXIII, Melnikov, p.62]

Aliaj tradukistoj ankaŭ uzas “vanto” por “sueta”

Kaj kun blindiĝo facilkreda
Amanto juna en konstant'
Rekuris post la kara **vant'**. (Nekrasov, l. c., p.76)

Facilanime kun pasio

Al ŝi revenas nun amant',
Sed lin forpuŝas nova **vant'**.
[Sergej Rublov (trad.) A. S. Puŝkin. Jaroslavl, Remder, 2002, p.330]

Multaj aliaj ekzemploj de uzado “vanto” por “sueta” troviĝas en la romano.

En vantaj streboj al fantomo	Призрака суетный искатель,
[4:XXII, Melnikov, p.84]	(suetnyj)

Seranto de fantom' en **vanto**, [Nekrasov, p.96]

Ne trovos tiun via **vanto**, [Rublov, p.350]

En la lasta ĉapitro trovas sin la vorto “vanto=sueta”.

Ĉagreno? vant' ? aŭ eble jam	Досада? суетность ? иль вновь
denove juna zorgo – am’?	Забота юности – любовь?

[8:XXI, Melnikov, p.187]

Bedaŭro? **vant'**? aŭ ree jam

La zorgo de l'juneco, am’?

[Nekrasov, p.179]

Ĉagreni? **Vanto**? Flirta flam’?

Aŭ de junec’ pasinta am’?

[Rublov, p.445]

Sufiĉaj estas ekzemploj por konstati, ke “sueta” estas tradukata per “vanto”. Tradukintoj klare komprenas pri identeco de du vortoj. Franca vorto “vanité” = rusa “sueta” = Esperanta “vanto”, tiu ĉi rilato povas esti formulata.

VANTO = NICHTO (NENIECO)

Aldonante al tio, per la “vanto” estas tradukita ankaŭ la koncepto de “nenieco” = nichtoĵnost’.

Kaj dume – ĝuu, ho vivanto,
facilan vivon sen rutin’!

Konscias mi pri ĝia **vanto**,
kaj ĝi apenaŭ **ligas** min;

[2:XXXIX, Melnikov, p.50]

Покамест упивайтесь ею,
Сей легкой жизнью, друзья!

Ее **ничтожность** разумею
И мало к ней **привязан** я

Kaj dume ĝuu vi, vianto,
La vivon flirtan sen rutin’!

Komprenas mi pri viva **vanto**,

Ne mutlte mi inklinas ĝin. [Rublov. p.318]

La signifo de “vanto” estas ĉi tie “nenieco”(nichto). Ankaŭ ĉi tie troviĝas la Budhaisma koncepto de alligiteco kaj liberiĝo (otreshennost’ i privjazannost’; attachment and detachment).

Nekrasov tradukis nichtoĵnost’ (nenieco) per la vorto “malvaloro”.

Do ĝuu dume nunan horon,

Facilan vivon, amikar’!

Mi scias ĝian **malvarolon**

Kaj forignorus ĝin sen bar’; [Nekrasov, p.66]

Melnikov inklinas multe uzadi tiun ĉi “vanto” eĉ en la loko, kie ne estas la egala vorto.

Amikoj, ĉio estas **vanto**!

[3 :XIII, Melnikov, p.57]

Друзья мои, что ж толку в этом?

Nekrasov tradukis laŭvorte.

Amikoj, kiu senc’ en tio ? [Nekrasov, p.72]

Oni povas vidi, kiel profunde konscias s-ro Melnikov pri la rialto inter la Predikanto kaj “Eŭgeno Onegin”.

DUELO KAJ HONORO

La temo de “falsa honoramo” estas prezentata en la sceno de “duelo” inter Onegin kaj Lenskij. Sed en la kulmino de “vanité” (en nuntempa signifo) rekte ne aperas la vorto “vanto”.

Jes, endus malestimo puna
pro liaj vortoj de provok’,
sed flustro, malsaĝula mok’...”

Kaj jen la opini’ komuna!
Risorto de honora sent’!
Por nia mondo fundament!
[Melnnikov, 6:XI, p.120]

Kaj jen do opini’ socia!
Risorto de l’honor’ kaj hont’!
Sur ĝi turniĝas do la mond’!
[Nekrasov, p.132]

Ĉu povus ili kun ridet’
sen sangoverŝo, en kviet’
disiri pace, sen provoke?
Sed la mondumo ĝis terur’
la falsan honton timas nur.
[Melnikov, 6:XXVIII, p.127]

Sed timas la malprava hont’
Sovaĝan juĝon de la mond’.
[Nekrasov, p.139]

Duelo tiutempe estis la solvo por la problemo de honto kaj honoro. La vorto “honor” estas forte ligita kun la “duelo”. Sed Puŝkin mem uzas ĝin alie por la esprimo de rilato inter tiuj vortoj en la sekva sceno

Kaj due: la poeto-bub’
stultumi rajtas – ni, sen dub’,
pardonu lin. Eŭgen’ racia,
pro korfavor’ al la junul’,
sin devus montri en skrupul’ –
ne pilk’ en kliŝa lud’ social,
ne knabo, arda en kuraĝ’,
sed viro kun **honest’** kaj saĝ.
[Melnikov, 6:X, p.120]

А во-вторых: пускай поэт
Дурачится; в осьмнадцать лет
Оно простительно. Евгений,
Всем сердцем юношу любя,
Был должен оказать себя
Не мячиком предрассуждений
Не пылким мальчиком, бойцом,
Но мужем с **честью** и с умом.

S-ro Melnikov, tradukinte la vorton « chest’=honor », uzas la vorton « honesto ». Kialo estas klara. Puŝkin skribas, ke viro kun honoro kaj saĝo devus eviti la duelon. Ŝajnas,

ke tio kontraŭus al ĝenerala koncepto de “duelo estas la agado pro honoramo”. Aliaj tradukistoj uzas ĉi tie la vorton “honor” nur fidele al la originala teksto.

Sed vir' kun saĝo kaj **honor'**. (Nekrasov. p.132)

sed vir-prudente, kun **honor'**. (Rublov, p.390)

but a man of **honor** and sense.

[Aleksander Pushkin, Eugene Onegin – A Novel in Verse. Translated from the Russian, with a Commentary, by Vladimir Nabokov in two volumes. V. II (Commentary/ index), Princeton University Press, 1981, p.232]

Tio ŝainas malgranda, sed Melnikov ne lasas eĉ la plej etajn detalojn, pensante ke la vorto “honor” kontraŭdirus al “duelo”. Mi ne povas malestimi lian komprenon de ŝlosilaj vortoj.

S-ro Melnikov konsciencie uzadas vorton « vanto » tie, kie estas plena ideo de Predikanto en la romano de Puŝkin.

Sed triste pensas ni, ke **vante**

juneco nia pasis for,

[Melnikov, p.182-183]

Но грустно думать, что **напрасно**

Была нам молодость дана,

Sed pensi estas tre ĉagrene,

Ke **vane** pasis nia jun'.

[Nekrasov. p.175, 8: XI]

Sed mi malgajas, - tute **vane**

Juneco nia pasis for.

[Rublov, p.441]

Ni trarigardis la uzadon “vanto” en la traduko de Eŭgeno Onegin. Laŭ mia opinio Esperanta traduko renaskigas la esencon de vortoj. “Vanité” en la franca lingvo nuntempe estas komprenata kiel “honoramo” aŭ “honoravido”. “Sueta” en rusa lingvo – “tumulto”, kaj “nichtozhnost” – “sensignifo”. Per Esperanta traduko pli klariĝis la rialto inter La Predikanto kaj “Onegin”. “Eŭgeno Onegin” estas la literaturo de orienta nihilismo, de filozofio de “nenio kaj vanto” t. e., ni povas vidi komunecon inter rusa literaturo kaj Budhaismo, preleganta grandan signifon de “vanto kaj nenio”.

Tra Esperanto, per Esperanto signifo de vorto fariĝas pli klara. Vortoj de nacia lingvo havas tre multajn signifojn dum la longa tempo de uzado. Alivorte nacilingvaj vortoj estas ĉirkaŭataj per diversaj signifoj, kiuj ofte kaŝigas esencan signifon. Traduko per Esperanto simpligas la vortojn, kaj purigas signifon de la vortoj. Tial rusa vorto “sueta” kaj franca “vanité” estas unuigita per unua Esperanta vorto “vanto”.

Koncerne al “vanity”, Vladimir Nabokov citas interesan frazon el la parolado de Edmund Burk pri la Franca granda revolucio.

«In a pamphlet published early in 1791 (*A Letter to a Member {Menonville} of the National Assembly; in answer to some objections to his book on French affairs*), Edmund Burk ... thus speaks of Rousseau: “We have had the ... founder of the **philosophy of vanity** in England... {who} entertained no principle... but vanity. With this vice he was possessed to a degree little short of madness. It is from the same deranged eccentric vanity...”.

Pushkin might have seen the French translation (*Lettre de M. Burk, à un membre de l'Assemblée Nationale de France*, Paris, 1811) » [Nabokov, l. c., p.]

Laŭ la opinio de Edmund Burk ekzistas, t. n., “filozofio de vanto”(philosophy of vanity), kaj la kreinto estis J. J. Rousseau, kiu prelegis antaŭ ĉio la revenon al “naturo”. Tiu ĉi komento estas tre grava en la du kampoj. Unue - rilate al la filozofio de Predikanto, due - al la komuneco kun Budhaisma koncepto de “vanto”, kiu estas samtempe la koncepto de Daoismo, taksanta alte la naturon.

Ankoraŭ ekzistas 5 aliaj tradukoj de “Eŭgeno Onegin”. Tio signifas, kiel profunde rusoj amas tiun ĉi romanon. Ĝi estas ja la fonto de rusa literaturo. En la prelego mi trafis nur tri el ĉiuj tradukoj. Sed oni povas diri, ke sen legi la tradukon de Melnikov nun ne eblas sufiĉa studo de “Eŭgeno Onegin”. Por la pli profunda esploro de rusa literaturo oni bezonas lerni Esperanton. Jam venas tempo lerni Esperanton por studi ne nur la rusan, sed ankaŭ la tutamondan literaturon.